

## CxEA-retkomunikoj 4/2003

1. Konferenco de CxEA en Litomyšl proksimigxas
2. La plano de arangxoj en Cxehxio aux organizitaj de Cxehxio gxis 2004
3. La Esperanto-Muzeo en Vieno
4. AL LINGVA DEMOKRATIO! (ALVOKO AL LA ESPERANTISTARO)

1. LA CxEA-KONFERENCO EN LITOMYŠL ALPROKSIMIGxAS  
Bv.ne pretervidi en la jxus eldonita Starto 3, ke la konferenco de CxEA okazos dum la semajnfino 17-a gxis 19-a oktobro en Litomyšl, la urbo protektita de Unesco kiel kultura heredajxo kaj famigita al ni esperantistoj pro la verko de Karolo Píč Litomixla tombejo. Cxifoje gxi okazos en tristela hotelo Dalibor, tamen tre favorpreze! Se vi ne havas cxemane "Starto", vi povas trovi cxuijn informojn kaj aligxilon ankaux sur la TTT-pagxo: <http://www.esperanto.cz>.

## 2 KALENDARO DE E-ARANGxOJ EN CxEHxIO AUx ORGANIZITA DE CxEHxIO: 2003:

2003-09-26/28 La 16-a Internacia Kultura Festivalo, Ústí nad Labem.

Kontakto (sekve nur K): [j\\_kriz@volny.cz](mailto:j_kriz@volny.cz)

2003-10-17/19 La 9-a Konferenco de Ceha Esperanto-Asocio, Litomyšl.

K: [cea.polnicky@quick.cz](mailto:cea.polnicky@quick.cz)

2003-10-22/29 Lingva Seminario en Skokovy.

K: [drahotovaesperanto@seznam.cz](mailto:drahotovaesperanto@seznam.cz)

2003-11-24/30 Internacia Paroliga Semajno en Dobřichovice. K:

[info@kava-pech.cz](mailto:info@kava-pech.cz)

2003-11-28/30 Paroliga semajnfino de CxEA, komune kun la supre menciita arango. K: [melicharkova@quick.cz](mailto:melicharkova@quick.cz)

2003-12-06 La 23-a Ceha-Saksa Tago, Ústí nad Labem. K:

[j\\_kriz@volny.cz](mailto:j_kriz@volny.cz)

2004:

2004-07-14/31 Flugkaravano de Prago al Universala Kongreso de Esperanto en Pekino (Cxinio). K: [info@kava-pech.cz](mailto:info@kava-pech.cz)

2004-07-31/08-07 La 54-a Kongreso de KELI (Kristana Kongreso) en Bystřice pod Hostýnem. K: [cea.polnicky@quick.cz](mailto:cea.polnicky@quick.cz)

2004-08-07/?? La ekspozicio "Esperanto - mezinárodní jazyk přátelství a spolupráce" (Esperanto - internacia lingvo de amikeco kaj kunlaboro), solena malfermo de la ekspozicio 07.08.2004. K:

"Jaroslav\_Pokorny" <[nzm@cmail.cz](mailto:nzm@cmail.cz)>

2004-08-14/21 Kongreso de SAT en Bratislava (Slovakio). K:

[info@kava-pech.cz](mailto:info@kava-pech.cz)

2004-08-21/28 Turisma Renkontigo en Prago kaj Bohemia Karsto, samtempe Postkongreso de SAT. K: [info@kava-pech.cz](mailto:info@kava-pech.cz)

2004-11-10/12 Terminologia Seminario de IFEF pri trafiko en Dobřichovice. K: [info@kava-pech.cz](mailto:info@kava-pech.cz)

2004-11-12/14 KAEST 2004, la cxeftemo pri la Esperanta terminologio. K: [info@kava-pech.cz](mailto:info@kava-pech.cz)

Se vi ne trovis vian arangxon en la listo, bv. sendi la informon pri gxi al [chrdle@kava-pech.cz](mailto:chrdle@kava-pech.cz), la listo estos kompletigota en venonta

eldono de retkomunikoj.

### 3. PRI ESPERANTO-MUZEO EN VIENO

Ne cxiuj esperantistoj scias, ke Internacia Esperanto-Muzeo (IEM) en Vieno (Austrio) ne nur funkcias, sed ecx progresas en sia funkciado. IEM estas parto de Austria Nacia Biblioteko kaj nuntempe troviĝas en Hofburg, tamen en la jaro 2006 aux 2007 gxi translokigos al la pli oportuna kaj pli facile alirebla loko en la strato Herrengasse, apud Ministerio por Internaj Aferoj.

IEM nun posedas 25 000 volumojn, 2 000 muzeajn objektojn, 2 000 manuskriptojn, 13 000 fotojn, 1 100 afisxojn kaj 40 000 flugfoliojn. Ciuj libroj de IEM estas enkomputiligitaj kaj la gazetoj estas nun enkomputiligitaj. Plejparto da materialoj estas interrete trovebla sur <http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/eo/index.htm>  
Cxiujare la muzeo plenumas informpetojn de proksimume 2 000 personoj.

IEM estis fondita en la jaro 1927 fare de Hugo Steiner. Nun travivas IEM sian plej esperdonan eraon, gxi havas 3 dungitojn sub la gvido de la direktoro Herbert Mayer kaj aplikas modernajn bibliotekajn kaj muzeajn procedojn. Kvankam gxi estas ekstermovada instituto, tamen gxi grave subtenas per sia agado la Esperanto-movadon.

Tial bv. ne forgesi, se vi pro iu ajn kialo vojaĝos al Vieno, enigi en vian vojaĝxprogramon ankaux viziton de IEM en Hofburg.

### 4 AL LINGVA DEMOKRATIO! (ALVOKO AL LA ESPERANTISTARO) (kaj aparte al la membroj de UEA/TEJO/ILEI)

Karaj membroj (kaj ne-membroj),

la Komitato de UEA dum la jxus pasinta Universala Kongreso en Gotenburgo taksis pozitivaj la atingajxojn sur la kampo de la laborplano dum la pasintaj jaroj kaj aprobis aktualigon de gxi por la jaroj 2003-2005.

Ni nun ree alvokas, por ke oni laboru laux la antauxviditaj prioritatoj ankaux en la komencigxanta labor-jaro.

La laborplano emfazas la jenajn prioritatojn:

\* informado

\* instruado

\* utiligado

kiuj estu atingataj kune kun

\* plijunigxo

\* tutmondigxo

\* profesiigxo.

Ili estas en si mem klaraj, kaj vi povas detale legi en la laborplano mem, kiel ili estas komprenataj. La teksto de la laborplano estas ricevebla per mesagxo al [uea@co.uea.org](mailto:uea@co.uea.org), per letero al la kutima adreso de UEA aux per aligxo al la listo [labor-plano-de-uea@yahoogroups.com](mailto:labor-plano-de-uea@yahoogroups.com).

Dum la pasinta jaro multo estis realigata en la kampo de informado kaj papera kaj reta. La kelkaj grandaj artikoloj en internacie gravaj gazetoj, kiuj aperis en la lastaj monatoj, estis sekvataj de amaso da artikoloj en naciaj kaj lokaj gazetoj kunlige kun la kampanjo gvidata de la Brusela Komunikad-Centro okaze de la Universala Kongreso.

Samtempe ankaux la Internacia Ligo de Esperantista Instruistoj, ILEI, kaj la junulara sekcio de UEA, TEJO, renovigis siajn estrarojn kaj pretas por pliaj laboroj kaj pliaj atingoj en la propraj kampoj.

La Komitato de ILEI aprobis tri agadprioritatojn:

1 - organiza plifortigxo,

2 - instrukapabligado,

3 - la projekto Interkulturo,

akorde kun la strategiaj prioritatoj de la labor-plano de UEA. Ili realigxos tra kunlaboro kun TEJO, kiu jam okazas precipe kun gxia laborgrupo "Esperanto@Interreto", kaj per plifortigo de kunlaboraj rilatoj kun la landaj sekcioj kaj cxiuj agantoj en la E-instrua kampo.

Ni varme konsilas, ke en cxiu lando kaj en cxiu organizajxo tra la tuta mondo estu almenaux unu homo, kiu respondecas pri la realigo de la labor-plano kaj aligxas al la listo, kie gxuste oni diskutas pri tio, per malplena mesagxo al la adreso

<labor-plano-de-uea-subscribe@yahoogroups.com>

aux alimaniere kontaktos nin.

Ni emfazas, ke nia intereso estas laboro kaj kunlaboro por Esperanto.

Personaj polemikoj, singravigoj kaj malgravigoj de aliaj esperantistoj neniom utilas por tiu intereso, sed ni celas ion pli gravan por gxi: ni volas atingi pli justan rilaton inter kulturoj kaj lingvoj en la mondo, kaj ni disponas konkretan rimedon por tio. Pri tio ni laboras kaj pri tio ni invitas vin labori.

Ni faros nian komunan eblon por helpi vin labori lau' la labor-plano kaj ni dankas vin pro viaj estontaj klopodoj.

Renato Corsetti, prezidanto de UEA

Bertrand Hugon, prezidanto de TEJO

Radojica Petrovic', prezidanto de ILEI

Trevor Steele, gxenerala direktoro de UEA □ □